**Hispana Esperanto-Federacio**
**ASOCIO KUN NACIA PUBLIKA UTILECO**

La deklaro okazis la dudek sepan de aŭgusto ene de Konsilio de Ministroj dank' al ideo de Juan Carlos Ruiz kiu preparis dosieron (kun helpo de.........) kaj al kontaktoj de Antonio Alonso ĉe Ministerio pri Edukado kiu sendis reprezentantinon al UK-Valencio.

Madrida Esperanto-Liceo estis la unua esperanto asocio kiu atingis tiun kategorion (ne nacia sed madrida), pro tio, la estraro de MEL oferas sian sperton al HEF por plenumi burokrataĵojn , prepari memoron, buĝeton, ekonomian bilancon, ktp kaj tiujn, kiujn devas jare prezenti al Ministerio (Kiu?. ĉu Edukado? ĉu Prezidanteco?). MEL kritikis kelkfoje (ankaŭ skribe al Prezidanto) la malbonan prezentadon de memoro kaj kontoj de HEF. Oni supozas ke ekde nun pli bone zorgos pri tio.

**MEL-BONA REZULTO DUM 1993**

Kiel vi mem povas konstati en la ekonomia bilanco de 1993, farita de Pedro Garrote, pere de speciala programo de Caja Madrid por kulturaj asocioj, la bilanco de 1993 estis pozitiva. La kontribuo de la koruso Verda Stelo, la donacoj de kelkaj liceanoj kiuj atingis senpage diversaĵojn dum la laboro en Madrido por Gazetara Servo de UK (ili donis la profiton al MEL ne al UK), la profito de la loterio, la vendado de libroj... kaj speciale la kotizoj de la membroj de MEL ĉiuj faris ke MEl povas vivi trankvile (ekonomie) almenaŭ dum 1994. Dankon al ĉiuj!

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. _is la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79
Venontaj programoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4º:

La lastan lundon de januaro, 25-an, okazos GENERALA ASEMBLEO DE MEL laŭ alvoko de prezidanto kaj kun jena tag-ordo:
1.- Aprobo/mal de la protokolo de antaŭa asembleo.(NV Feb/93)
2.- Informo de sekretariino pri jar-aktivaĵoj (NV Dc/93)
3.- Aprobo/mal de kontoj 1993 prezentitaj de vic-prezidanto (NV JN/94)
4.- Aprobo/mal de 1993 programo kaj buĝeto.(NV JN/94)
5.- Demandoj

Kiel kutime, lunde, dum decembro kaj januaro oni antaŭ-diskutas tag-orderojn. Okaze de malsano de nia prezidanto S-ro González Aboín, la asambleo estos prezidota de Pedro Garrote, vic-prezidanto. Ni deziras rapidan resaniĝon al S-ro Aboín.

**LOTERIO**

Madrida Esperanto-Liceo atingis novan rekordon en la vendado de Kristnaska loterio. La neta profito estis 189.880 pesetojn. Dankegon al esperantistoj de Madrido kaj provincoj kaj al esperanto-apogantoj kiuj malavare aĉetis kaj vendis biletojn.

N I A V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
 lunde vespere (91) 5 30 87 98 * fax (91) 5 71 08 52
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz JANUARO 1994

**ZAMENHOFA BANKEDO**
26 esperantistoj ĉeestis abundan kaj bonkvalitan bankedon en Hotel Puerta de Toledo, inter ili diversaj ne kutimaj vizitantoj de la Liceo: Lucrecia, geedzoj Figuerola, Augusto, Alicia, Mamen kaj kelkaj membroj de la koruso "Verda stelo"

**ANKORAŬ UK-VALENCIO**
Luis Ojer projekciis en la Liceo videon faritan de li dum UK-Valencio. Liceanoj multe amuziĝis rememorante neforgeseblajn tagojn en la Turia urbo.
Dum la madrida zamenhofa bankedo Augusto Casquero informis pri la ekonomia profito de UK: **kelkaj milionoj** por Valencia Grupo kaj por HEF. Al Madrida Esperanto-Liceo LKK donis memor-platon dankante la laboron de ĝiaj membroj en la organizado de UK kaj al madridaj helpantoj redonis kotiz-aliĝon. Bedaŭrinde LKK forgesis kelkajn nomojn en la listo de helpantoj inkluzive personoj kiuj ne estas esperantistoj sed kun sia laboro ili helpis al madridanoj solvi aferojn rilate UK, por ili MEL petis al LKK krommonon por aĉeti simbolan donacon.

**DONACO AL MEL**
Madrida Esperanto-Liceo ricevis belegan pentraĵon faritan de Pepe Fernández-Arroyo. Temas pri granda desegno de la kreinto de la internacia lingvo, nia kara Ludoviko Zamenhof. Dankon!

**AĈETU "Esperanto: fenómeno de la comunicación", la plej aktuala libro hispan-lingve pri la internacia lingvo. Prezo 1.300 ptjn (inkludas IVA-on kaj sendokoston al Hispanio). 20% rabato por pli ol 5 ekzempleroj. ANTAŬPAGO NECESE, pere de POŜTĜIRO, al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4º. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON.**

**NOVA JURO POR "Heroldo"**
La 20-an de a_gusto 1993, "Heroldo de Esperanto" akiris italan juran personecon per notaria akto, ĝis tiam havis hispanan juran personecon. Nun ĝi estas kultura asocio sen profita celo. HdE (1881) 6 novembro 1993

F e l i ĉ a n 1. 9 9 4 !!!!
.........................................................................

ESPERANTO LICEO DE MADRID Atocha 98-4º 28012 Madrid